

Basyoo

Streta vojo al fora interno:

El Kurobane ĝis Date-no-Ookido

(Tradukis en Esperanton kaj rimarkigis Teruhiro Sasaki)

黒羽の館代浄坊寺何かしの方に音信ル

Ni vizitis iun s-ron Zyooboozi, kastelintendanton de Kurobane.

Rim. : Zyooboozi Takakatu (1661-1730 aŭ -1732) havas tiam 29 jarojn. Li havas pseŭdonimojn «Syuuu» kaj «Tousetu». Laŭ la taglibro de Sora ili vizitis s-ron Takakatu en 4-a de kvara monato.

思ひかけぬあるしのよろこひ日夜語つづけて 其弟桃翠など云か朝夕勤とふらひ自の家にも
伴なひて親属の方にもまねかれ日をふるままに

Tiu mastro tiel ĝojas, ke ni ne atendis tion, kaj daŭris kun ni interparoladi tage kaj nokte. Lia frato, nomata Tousui [Verda persiko], servadis nin matene kaj vespere, akompanis nin al sia domo. Ni estas invititaj eĉ de liaj parencoj. Tiele pasis tempo.

Rim.: Tousui (aŭ Suitou) [1662-1728] aliĝis al la skolo de Basyoo en la jaro 1676, kaj lia frato en 1675. Laŭ la taglibro de Tousui Basyoo vizitis lin en 3-a de kvara monato, pli frue ol la tago de vizito al Takakatu.

日とひ郊外に逍遙して犬追うものの跡を一見し那須の篠原をわけて玉藻の前の古墳をとふ

Iam ni promenis ekster la urbo kaj vidis la lokon de Inuoumono [ĉasado de hundoj per pafarkoj fare de rajdantoj sur ĉevaloj], iris laŭ la kampo de Nasu, kaj vizitis la malnovan tombon de la feovulpino Tamamo.

Rim.: Inuoumono estis sporto, farata en la ĉirkaŭfermita loko, kie forlasitajn hundojn ĉasas rajdantoj sur ĉevaloj. Estas dirite, ke tiu sporto komenciĝis en Nasu por trejnado ĉasi vulpojn.

Rim.: Tamamo – feovulpino, vulpino kun oraj haroj kaj naŭ vostoj, komence ĝi estis diino en Hindujo kaj fariĝis edzino de iu reĝo en ĉina Tang-dinastio, poste venis al Japanio kaj fariĝis amata de la eksmikado Toba. Ĝi estis mortigita en Nasu kaj ŝanĝiĝis en la mortigan ŝtonon. Kiuj ajn tuŝas tiun ŝtonon, ĉu homoj aŭ vestoj aŭ birdoj, tiuj devas tuj morti.

それより八幡宮に詣与市宗高扇の的を射し時別てハ我国氏神正八まんとちかひしも此神社にて侍ると聞ハ感応しきりに覚らる。

Post tio ni adorvizitis la sanktejon Hatimanguu. La fama pafarkisto Nasu Yoiti, celante al ventumilo, faris preĝon al ĉi tiu dio, dirante, “Mi aparte petas al la dio Hatiman de mia hejmloko”. Aŭdinte tion, des pli mi sentis forte impresita.

Rim. : Notita sanktejo estas Kanemaru Hatimanguu, Nasuno-zinzya. Multaj komentintoj diras, ke Basyoo erare skribis pri adorata preĝejo de Nasu Yoiti. Ili opinias, ke laŭ Heike Monogatari preĝis Yoiti al Yuzen Daimyouzin-zinzya, kiu situas en Yumoto, varma fonto de Nasu. Pri tio, kial Basyoo eraris, ĝis nun estas diversaj opinioj. Unuj imputas eraron al la gvidanto-ĉiĉerono, Tousui, aliaj atribuas kialon al la komuna apoteozo de du supre menciitaj sanktejoj. Basyoo adorvizitis ankaŭ la sanktejon en Yumoto kaj vidis tie postlasitan objekton de Yoiti. Laŭ mia opinio estas malfacile difini, ke Basyoo eraris aŭ ne, ĉar Yoiti antaŭ pafarko preĝis al “Hatiman Daibosatu, aparte niaj landaj Dioj, Nikkou, Utunomiya kaj Nasuyuzen Daimyouzin”. [Heike Monogatari; Genpei Seisuiki] Se Yoiti antaŭ

ĉio nomumis Hatiman, tiam estis nature, ke Basyoo pensis per tio la sanktejon Hatiman en Nasu, lia hejmloko. Basyoo vizitis la sanktejon Hatiman en la 13-a tago de kvara monato.

Rim.: Nasu Yoiti estas vasalo de Genzi. Li sukcese pafis ventumilon sur boato de Heike dum la batalo Yasima [j. 1185].

暮れハ桃翠宅に帰る 修験光明寺と云有 そこにまねかれて行者堂を拝す

Krepuskiĝis kaj mi revenis al la domo de s-ro Tousui. Apude staras la templo Komyoozi por monto-adora religio “ŝugendo”. Oni invitis min tien, kaj mi adoris la kapeleton (Gyouzuya-dou) de la fondinto de ŝugendo.

Rim.: Ŝugendo estas japana montkulta religio sinkretisma kun budhismo. Kiu okupiĝas per ŝugendo, tiu nomiĝas Jamabuŝo, montvaganto-asketo. Fondinto de Ŝugendo estis la sankto En-no Gyouzuya de Nara epoko. En la kapeleto estas prokultata la montgrimpada lignoŝuo (getao kun unu dento). Laŭ taglibro de Sora oni invitis Basyoo al Koumyouzi en 9-a tago de kvara monato antaŭ la vizito al Hatiman.

夏山に足駄をおかむ首途哉

Ĉe somera monto,

Adoris getaojn,

Je la ekvojaĝo

[Natu yama ni asida o ogamu kadode kana]

当国雲岸寺のおくに仏頂和尚山居の跡有

Profunde malantaŭ la templo Unganzi en ĉi tiu lando restis ruino de monta ermitejo de mia mentoro de Zen, bonzo Buttyou.

Rim.: Buttyou [1640?-1715] estis por Basyoo la insruisto de Zen. Buttyou lernis Zen en Konponzi de Kasima kaj en Zuiganzi de Matusima. Kiam li devus okupi la postenon de la 21-a ĉefbonzo en la Konponzi, tio estis rezignita de la ŝintoisto-episkopo en Kasima-Zinguu, kiu krome volus duonigi la templan teritorion de Konponzi. Buttyou iris al Edo por akuzi la episkopon kaj gajnis finfine la proceson en 1682. Li loĝis en Hukagawa dum sia restado 9 jarojn en Edo. Ĉirkaŭ 1681 li renkontiĝis kun Basyoo kaj instruis al li Zen-Budhismon. Post la venko je la proceso li tuj ekŝiĝis de ĉefbonzo. Kaj Basyoo vizitis lin en 1687, kiel skribite en la Vojaĝlibro de Kasima. En 1715 li mortis en la templo de Unganzi.

豎横の五尺にたらぬ草の庵 むすふもくやし雨なかりせは

Herba ermitejo

kun malpli ol la kvadrato de 150 cm.

Se ne pluvus, mi ne konstruus,

Al mi ja estas ĉagrene fari eĉ tion.

[Tate yoko no go syaku ni taranu kusa no io, musubu mo kuyasi ame nakari seba]

として松の炭して岩に書付侍りといつそやきこえ給ふ

Mi iam aŭdis de li mem ke tiel li skribis sur la rokon per karbo de pino.

Rim.: Buttyou en ĉi tiu verso esprimis sian sintenon al la ermitejo, kiun eĉ konstrui estas al li domaĝe, ĉar tio signifas fiksloĝan loksidon, malhelpantan al li veran trejnadon de Zen. Certe, ankaŭ Basyoo konsentus kun Butyoo pri tiu sintenado, komparante vivon en la mondo, en la ermitejo kaj en la vojaĝo.

其跡みむと雲岸寺に杖を曳ハ 人々すすむて共にいさなひ若き人おほく道の程打さハきておほえず彼麓に至る

Mi volis vidi tiun lokon kaj piediris al la templo, apogante je bastono. Oni propravole akompanis min, multaj junuloj gajis laŭ la vojo, do, ni fine atingis montpiedon dum mi ne sciis.

山はおくあるけしきにて谷道はるかに松杉くろく苔したたりて卯月の天今猶寒し 十景尽る所橋をわたつて山門に入 さて彼跡はいつくの程にやと後の山によちのほれは石上の小庵岩窟にむすひかけたり 妙禅師の死関法雲法師の石室を見るかことし

La monto montriĝas profunda, pado laŭ valo daŭras tre longa, arboj de pino kaj kriptomerio svarmas nigre, musko estas malseka, vetero en la kvara monato estas ankoraŭ malvarma. Tra dek pitoreskaj lokoj laŭ la vojo, transirinte ponteton, ni eniras pordon de la templo. Do, kie troviĝas la ruino? Mi grimpas sur la malantaŭan monton, kaj vidas, la eta ermitejo sur ŝtono staras ĉe kaverno. Ŝajnas al mi, kvazaŭ mi vidus la “barieron de morto” de ĉina zenmajstro Myouzenzi [1238-1295] aŭ la ŝtonan ĉambregon de Houun, kiuj daŭris sidi kun decido por ne eliri vivaj de tie.

Rim.: Japanaj temploj ofte havas siajn belegajn lokojn, kies ensemblo estas nomita “dek pitoreskoj”.

Rim.: Myouzenzi estis la fama ĉina zenmajstro, nomata ĉine Gaofeng Yuanmiao. Li trasisidus ferman 15 jarojn, kun devizo “bariero de morto”, t.s., decidon, por ke li ne eliru, se ne atingus altan iluminigon.

Pri tio, ke kiu estis Houun, estas diversaj opinioj. Unuj atribuas lin al ĉina bonzo, kiu konstruis la templon Fayun-si (japane Houun-zi) en la epoko Liang, aliaj – al japano, Nakamine Akimoto [中峰明本], kiu fondis la unu skolon de japana Zen, nomatan “Genzyuu-ha” [Skolo de efemera loĝado], al kiu apartenis Buttyou.

木啄も庵はやぶらず夏木立

Eĉ pegoj

Ne difektas la ermitejon

En somera arbareto

[Kitutuki mo io wa yaburazu natu kodati]

ととりあへぬ一句柱に残侍し

Mi almetis improvizite ĉi tiun verson al la fosto.

Rim.: En japana hajko unu sezonvorto [Kigo] estas konsiderata kiel grava bezonaĵo. En la supra hajko, kontraŭe al la kutimo, estas miksitaj du sezonvortoj, “somera arbaro”, signifanta someron, kaj “pego”, signifanta ĝenerale aŭtunon. Pego=Kitutuki havas alian nomon en japana lingvo “Teratutuki”, kio signifas “pikanto per beko templon”. Tio devenas de la legendo, ke Mononobe Moriya [?-587], kiu kontraŭis je la enkondukon de Budhismo en Japanion, metamorfozis sin post sia morto en la

pegon, strebante detruj templojn de Budhismo.

是より殺生石に行 館代より馬にて送らる 此口付のおのこ短尺得せよと乞 やさしき事を
望侍るものかなと

Post tio ni ekiris al la Mortiganta ŝtono, Sessyooseki. La kastelintendanto veturigis nin per ĉevaloj.
La grumo de mia ĉevalo petis min, dirante “Bonvole donu al mi vian version, skribotan sur kartono!”.
Mi skribis por li, pensante, kian delikatan senton li havas.

野をよこに馬牽むけよ郭公

Surfone de la kampo

Ekbaŭmigu la ĉevalon

Ho, Kukolo-Muzo!

[No o yoko ni uma hiki muke yo hototogisu]

Rim.: Ĝis nun komentistoj afliktiĝas pri sia interpreto de tiu ĉi verso, ĉar oni diras, ke malfacile estus asocii la kampon de Nasu kun kukolo. Mi tradukis laŭ mia propra kompreno. Kukolo ĉi tie estas parnasa simbolo. Basyoo estis tre kortuŝita per la peto de simpla grumo, kiu havas amon al poezio. Kampo Nasu asocias la batalkampon, ĉar tie kontraŭ la feo-vulpino Tamamo batalis la bravulo Miura Kazusanosuke kaj tie naskiĝis la fama pafarkisto Nasu Yoiti, kaj tie manovradis la armeo de la registaro Kamakura. Basyoo rajdis tiam sur belega ĉevalo de la kastelintendanto, tiel do en sia hajko li duone kun ŝerco pozus kiel generalo, same kiel Petro la Granda aŭ Napoleon, rajdanta sur baŭminta ĉevalo.

殺生石は温泉の出ル山陰にあり 石の毒氣いまたほろひす 蜂蝶のたくひ真砂の色の見えぬ
ほとかさなり死ス

La Mortiganta ŝtono troviĝas, kaŝate per monto, kie ekfluas varma fonto. Veneneco de la ŝtono ankoraŭ ne malaperis, tial abeloj, papilioj k.s. mortiĝis, kuŝante unuj sur aliaj tiel, ke ne videblas la koloro de sablo.

Rim.: La Mortiganta ŝtono ekzistas malantaŭ la tiu monto, kie situas la sanktejo Yuzen Daimyouzin zinzya. El tiu ŝtono elŝprucis venengaso, pro kio mortiĝis insektoj, birdoj kaj eĉ homoj. Laŭ legendo metamorfozis sin en la venenan ŝtonon la feo-vulpino Tamamo.

又清水流るゝの柳ハ芦野の里にありて田の畔に残る 此所の郡守戸部某の此柳みせはやなと
折々にの給ひきこえ給ふをいつくのほとにやと思ひしをけふこの柳のかけにこそ立寄侍つれ

Kaj la saliko Yugyouyanagi, kantita de la virtuoza Saigyou, restas en la vilaĝo Asino sur kampo de rizejo. Lia moŝto Kohou, guberniestro de ĉi loko, ofte diradis, ke mi vidu ĉi tiun salikon. Do mi volis scii, kie ĝi estas. Hodiaŭ mi staris finfine sub la saliko.

田一枚植て立去ル柳かな

Unu kampon da rizo

Plantinte,

Foriras la saliko.

[Ta iti mai ue te tati saru yanagi kana]

Rim.: La Mortiganta ŝtono kaj la saliko Yugyouyanagi estas ankaŭ la famaj kantoj de teatro Noo (Utajo). Basyoo vizitis sinsekve du lokojn, kantatajn en Noo. Nomo de saliko Yugyouyanagi devenas de la Nooa epizodo, ke iu migranta bonzo apenaŭ povis trovi vojon dank' al la spirito de la velkanta saliko.

Poemo de Saigyou estas sekve:

“Mi haltis iom da tempo en la ombro ĉe la saliko,
sub kiu fluas pura akvo laŭ vojeto”

Kohou estis Asino Minbu Suketosi [1636-1692], kies pseŭdonomo de hajko estis Tousui.

Pri ĉi tiu hajko pri saliko estas tre malfacile kompreni, kiu plantis rizon kaj kiu foriris, ĉu kampulinoj, ĉu Basyoo, aŭ spirito de saliko? Laŭ gramatiko la subjekto devas esti la saliko. Tiel do mi tradukis la hajkon, sekvante la gramatikon. Tiam signifo de hajko estas akceptita jene – pejzaĝo kun pura rivereto nun ŝanĝiĝis al unu rizkampo, kaj la antaŭa saliko ĉe Saigyou foriris. La nuna rizkampo ankaŭ iam nepre ŝanĝiĝos. Kaj pejzaĝo kaj poetoj foriras. Angla traduko havas la jenajn:

a whole rice paddy planted – I depart from the willow (Barnhill)
They sowed a whole field, And only then did I leave Saigyo's willow tree.(D. Keen)
Rice-planting done, they depart – before I emerge from willow shade. (Hamill)

Laŭ la komentaria libro “Sugagomo”(1778), kiam vizitis la komentisto, jam staris la saliko Yugyouyanagi ĉe la Torijo-pordo de la Hatiman sanktejo. La saliko ankaŭ migradas, ĉar la fono ŝanĝiĝas kun la trapaso de tempo.

心もとなき日数重るまゝに白河の関にかゝりて旅心定めぬ いかてみやこへと便もとめしも断なり

La tagoj pasis ĝis nun, dum ŝanceliĝema estis mia koro, sed mia decido firmiĝis, trapasante la pordo-barieron Sirakawa, la eniron al la Nordo. Estas nature, ke iu antikvulo volis “kiel ajn sendi leteron al ĉefurbo” dum la trapaso.

Rim.: La antikvulo estas Taira Kanemori (?-990). De post la trapaso tra Sirakawa komenciĝis vera vojaĝo al fora interno, tial Basyoo skribis, ke decido firmiĝis. Laŭ la taglibro de Sora, Basyoo redonis haoron-surtuton, donitan de la amiko en Kurobane. Tio signifas, ke Basyoo vestiĝis perfekte en bonza vesto ĉe la Sirakawa bariero.

此関は三関の一にして風騷の人こゝろをとゝむ 秋かせを耳に残しもみちを佛にして青葉の梢猶あはれ也 卯の花の白妙に茨に花の咲そひて雪にもこゆるこゝちそする 古人冠をたゝし衣装を改し事など清輔の筆にもとゝめ置れしとそ

Ĉi tiu bariero estas unu el tri famaj, kaj kiu havas poetan fajnecon, tiu povas esti kortuŝata ĉi tie. Sub la impreso de antikvaj poemoj restus en oreloj aŭtuna vento kaj videblus karmezinaj folioj de acero. Tamen nun, kiam mi vidas ĉe acero nur branĉojn kun verdaj folioj, ju pli grandiĝas imagoj, des pli beliĝas la pejzaĝo ĉirkaŭ la pordo. Floras ege blankaj deŭzioj kaj kune kun sovaĝaj rozoj, do ŝajnas al mi, ke mi trapasus ĉi pordon kvazaŭ tiam, kiam neĝus. Per plumo de Huziwara Kiyosuke estas

enskribita, ke, trairante la pordon, iu antikvulo vestis sin belaj kaj pravigis ĉapon.

Rim.: Pri tio, kiuj barieroj estas tri famaj, disiĝas opinioj inter komentistoj.

Rememorante antikvajn poemojn pri Sirakawa, Basyoo prezentas al si aŭtunan kaj vintran pejzaĝojn. Aŭtunan venton aŭdas Basyoo, apogante je la fama poemo de Nouin (?-998): “Ekiris mi de ĉefurbo en printempa nebuleto, nun jam blovas aŭtuna vento ĉe la Sirakawa variero”. Instigas al li aceron la alia poeto Minamoto Yorimasa (1104-1180), kiu versis: “En ĉefurbo videblis ankoraŭ verdaj folioj, tamen nun sterniĝas karmezinaj folioj sur la bariero Sirakawa”. Sovaĝaj rozoj ĉi tie havas belan koloron. Multe da poetoj verkis pri neĝo en Sirakawa, tial do Basyoo fantazias neĝan barieron per belaj floroj.

Huziwara Kiyosuke [1104-1177] estis la fakulo pri poetiko kaj skribis en sia libro “Hukuro Sousi”, ke iu Takeda Tayuu Kuniyuki, formale vestiĝinte, trapasis la barieron.

卯の花をかざしに関の晴着哉 曾良

Per deŭzio kapornamite,

la pordbarieron trairas.

Tio estas la ceremonia vestado.

[Unohana wo kazasi ni seki no haregi kana]

Sora verkis tiele.

Rim.: Pri tio, kiu trairas en ĉi tiu hajko, apartiĝas opinioj en du tendarojn. Unuj atribuas al Takeda Tayuu, aliaj – al Sora. Mi opinias Sora kaj Basyoo trairantaj kun deŭzioj. La vestojn, donitajn en Kurobane, ili forĵetis antaŭ la eniro en Sirakawa, kiel skribite de Sora en 21-a de kvara monato [la 8-a de junio laŭ sunkalendaro].

とかくして越行まゝにあふくま川を渡る 左りに会津根高く右に岩城相馬三春の庄常陸下野の地をさかひて山つらなる かげ沼と云所を行にけふは空曇りて物影うつらす

Tiele trapasinte, ni transiris riveron Abukuma. Maldekstre alte staras la monto Aizune [Bandai], dekstre videblas vilaĝoj Iwaki, Souma, Miharu, ĉenas montoj, kiuj estas la limo inter regionoj Hitati kaj Simotuke. Ni iras laŭ la lago, nomata Kagenuma, ŝpegula lago, sed hodiaŭ ombras ĉielo, tial ne bone reflektas.

Rim.: Abukuma estas nomata alie “Oukuma”, kiu inkluzivas signifon “renkontiĝo”. Kaj tiu rivero fariĝis la poezia loko de Utamakura.

須か川の駅に等窮といふものをたつねて四五日とゝめらる 先白川の関いかにこえつるやと問 長途のくるしみ身心つかれ且は風景に魂うハ、れ懐旧に腸を断てはかばかしうおもひめくらさす

Ni vizitis ĉe la stacio Sukagawa unu hajkiston, s-ron Toukyuu [1638-1715], kiu lasis nin resti ĉe si dum kvar-kvin tagoj. Antaŭ ĉio li demandis min, “Kiel vi trapasis pordobarieron Sirakawa?” [tio signifas, kiun poezion vi versis] Mi diris al li: “Ĝenante pro la longa vojaĝo, laciĝinte je korpo kaj spirito, aŭ elravite de pejzaĝo, rememorante korŝire malnovajn poetojn, mi ne povis sufiĉe elpensi propran verkon. Estas domaĝe, se nenion mi farus, do mi versis tiele.

風流の初やおくの田植うた

Poezia komenco,

de la nordo
la ĥoro por rizpriklado
[Huuryuu no hazime ya oku no taue uta]

無下にこえむもさすかにと語れハ脇第三とつゝけて三巻となしぬ

Tiam al tiu la aliaj alligis siajn versojn, duan rulaĵon kaj trian, kaj kompletigis triopo de verkoj.

Rim.: La bariero Sirakawa estis la simbolo de la japana ŝtatpotenco kontraŭ la nordaj malamikoj[Ainu]. Poste ĝi fariĝis la simbolo de eniro al fora provinco kaj estis kantata kiel la poezia loko por vojirantaj poetoj. Sed Basyoo ĉi tie sentas tute alie ol antaŭuloj. Li antaŭ ĉio aŭdas popolan kanton por rizpriklada laboro. Malaperis la antaŭa bariero, majesta kaj aŭtoritata. Malsame de Nouin kaj Yorimasa, Basyoo atentis nek venton, nek foliojn, sed por li aŭdeblas la popola ĥoro, kiu devas esti por li unua komenco de estetiko. Okaze de la saliko Yugyouyanagi, Saigyou kantis pri la pura akvo, sed Basyoo pri la rizkampo. Rizkampo ne estas nur pura naturo, sed artefarita naturo fare de homa laboro.

この宿の傍に大き成栗の木陰をたのみて世をいとふ僧有 橡ひろふ太山もかくやと間に覺
られてものに書付侍ル 其詞 栗という文字は西の木と書て西方浄土に便ありと行基菩薩の
一生杖にも柱にも此木を用給ふとかや

Apud la staciurbeto loĝas unu bonzo sub granda kaŝtano, forlasinte mondon. Ŝajnas, ke tia povus esti la Profunda monto, kie oni prenis hipokaŝtanajn glanojn. Mi priskribis en la papero tiele.

“Ideogramo de kaŝtano konsistas el la ideogramoj “okcidento” kaj “arbo”, tial havas rilaton kun la okcidenta pura lando, do onidire, eĉ Sankta Gyōki [668-749] uzas tiun arbon por bastono kaj por fosto”.

世の人の見付ぬ花や軒の栗
Al homoj en la ordinala mondo
ne rimarkeblas tiaj floroj,
kiel kaŝtanaj ĉe alero

[Yo no hito no mitukenu hana ya noki no kuri]

Rim.: Laŭ la taglibro de Sora tiu bonzo estas Kasin (Yanai Yasaburou, Ritusai), kies ermitejon Basyoo vizitadis en 23-24 de kvara monato.

Pri la Profunda monto (Taisan) estas diversaj opinioj inter komentistoj. Unuj opinias, ke tia estis la sceno, versita de Saigyo pri profunda monto, kie li prenis hipokaŝtanajn glanojn. Aliaj atribuas ĝin al Du fu, aŭ al Ji Wu, aŭ al Zhuan-zi, aŭ al Budhao.

Gyōki [668-749] devenis de la reĝa familio de Pekche (Kudara). 15 jaraĝa, li bonziĝis kaj lernis budhismon en la templo Yakusi-zi ĉe la bonzoj Siragi Keiki kaj Gien. Kiel vaganta bonzo li vojiradis en diversajn lokojn kaj konstruadis pontojn, vojojn, digojn, templojn k.a. Lia religia agado longe estis subpremita de tiama registaro kvazaŭ pro delogigo de popolo. Ĉar, estas skribite, ke ĉien ajn li iradis, post lin svarmadis popoloj, adorante lin. Finfine, laŭdate de la imperiestro Syōmu Tennō [701-756 (reĝ.724-749)], li fariĝis la granda ĉefbonzo en 15-a jaro de Tenpō [743].

La hajko laŭdas vivmanieron ne nur de la ermito Kasin, sed la granda bonzo Gyōki. Nerimarkeblaj floroj de kaŝtano estas la simbolo de la okcidenta pura lando de Budahismo. Tra io banala, estanta tre

proksime ĉe la alero de domo, vidas la grandulo tion, kio ne videblas al ordinaluloj.

等窮か宅を出て五里計檜皮の宿を離れてあさか山有 道よりちかし 此あたり沼多し かつ
み刈比もや、ちかうなれはいつれの草を花かつみとは云そと人々に尋侍れとも更知人なし
沼を尋人にとひかつみかつみと尋ありきて日は山の端にかゝりぬ

Irinte ĉirkaŭ 5 leŭgoj [20 km] for de la domo de s-ro Toukyuu, kaj trapasinte la etapon Hihada, ni trovis la monteton Asakayama, starantan proksime de la ĉefvojo. Ĉi tie estas multe da marĉoj. Jam proksimiĝas tempo falĉi herbon, nome Katumi, do mi demandis al homoj, kiu herbo nomiĝas la flor-katumi [en la marĉo de Asaka, kantata en la poemaro Kokinsyuu.] tamen neniu scias. Dum mi serĉadis la marĉon, demandadis, murmurante “Katumi, katumi”, jam suno subiras sur monteĝo.

Rim.: Nun estas neidentigebla, kio estis “Katumi”. Ĉi herbo aperas en la poemo de Huziwarra Sanekata [?-998], kiu fariĝis distriktestro Mutu kaj mortis tie. Lia poemo en Kokinsyuu estas jene:

En profunda Nordo

floras Katumi en marĉo de Asaka,

Al spektanto ekflorus la dolĉa amo

[Mitinoku no Asaka no numa no hana Katumi katu miru hito ni koi ya wataramu]

Pri Katumi troviĝas diversaj opinioj. Unuj atribuas ĝin al Makomo (Zizanio), aliaj al irido.

二本松より右にきれて黒塚の岩屋一見し福嶋に泊る

Ni turnis dekstren ekde la loko Nihonmatu [Du pinarboj], ekvidis la rokan kavon en Kurozuka, tranoktis en la urbo Hukusima.

Rim.: Kurozuka [Nigra tombo] estas legenda loĝejo de demonino, kiu mortigas por manĝi vojaĝantojn. Tio estas kantata en la utajo de teatro Noo.

あくれはしのふもち摺の石を尋て 忍ふの里に行 遥山陰の小里に 石半土に埋てあり
里の童部の来りてをしへける むかしはこの山の上に侍しを 往来の人の麦艸をあらして
この石を試侍るをにくみて この谷につき落せは 石のおもて下さまにふしたりと云 さ
もあるへき事にや

En sekva tago ni iris al la vilaĝo Sinobu por vidi ŝtonegon “Sinobumozizuri”. En la fora vilaĝeto sub monto estas la ŝtono enterigita duone. Knabo diris al ni: “Ĝi staris iam sur la monto, sed scivolemaj vojaĝantoj, preninte cerealojn, provadis ŝmiri sur ĝi, do vilaĝanoj malamamis tion, kaj faligis ĝin suben ĉi tien, tiam ĝi renversiĝis kun kapo malsupre”. Tio vere povus okazi.

Rim.: Sinobumozizuri estas la ŝtono, uzita antaŭe por tinkturado de ŝtofoj kaj ofte kantata en poezio kiel simbolo de virina amo. Basyoo skribis pri la ŝtono: “Ĉi ŝtono antaŭe iĝis la amŝtono por virinoj”. Estis legenda, ke sur la ŝtono aperus la vizaĝo de amata viro.

早苗とる手もとや昔しのぶ摺

Virinaj manoj, prikladantaj riz-plantidon,

Rememorigas min pasintecon,

Kiam oni tinkturadis sur la ŝtono.

[Sanae toru temoto ya mukasi sinobu zuri]

Rim.: El manoj Basyoo imagas virinan enamiĝon. Virinaj manoj estas ne nur por laboro de

rizplantado kaj tinkurado, sed ankaŭ por preĝo de amo. Estas notinde, ke Basyoo versis serion de hajko pri riz-plantado surfone de saliko, kanto kaj ŝtono. Tra la virinaj manoj, plantantaj rizidojn, imageblas al la poeto tuta historio de la vivo en nord-orienta provinco. La fora provinco Oku montriĝas al Basyoo laborlokon de virinoj.

月の輪の渡しを越て瀬の上と云宿の出ツ 佐藤庄司か旧跡ハひたりの山際一里半計に有

Transiris ni la pramejon ĉe Tuginowa kaj alvenis al la etapa urbo Senoue. La malnova vestiĝo de la guberniestro Satou troviĝas je ĉ. unu leŭgo kaj duono maldekstre sur la piedo de monto.

Rim.: Satou Motoharu estis vasalo de Huziwara Hidehira, kaj regis subguberniojn Sinobu kaj Date. Li estas fama kiel patro de Tugunobu kaj Tadanobu, bravaj fratoj, fidele servintaj al la generalo Minamoto Yositone. Estas skribite diverse en historiaj libroj pri la sorto de Motoharu, aŭ li mortis en 1189 dum la batalo kontraŭ Yoritomo [laŭ *Azumakagami*], aŭ li estis amnestiita [laŭ *Hiraizumi-si*], aŭ li mortis pro ĉagreno post la adiaŭo kun siaj filoj [laŭ *Joruro*]. La vestiĝo estis la ruino de kastelo “Outori (Birdego)” kaj lia ĉirkaŭaĵo.

飯塚の里鯖野と聞て尋く行に丸山と云に尋あたる 是庄司か旧館也 麓に大手の跡など人のをしゆるにまかせて涙を落し 又かたはらの古寺に一家の石碑を残ス 中にも二人の嫁かするし先あはれなり をんななれ共かひがひ敷名の世に聞へつるもの哉と袂をぬらしぬ 墜涙の石碑も遠きにあらず 寺に入てちやを乞へは爰に義経の太刀弁慶か笈をととめて什物とす

Mi aŭdis, ke la nomo de la loko estas “Sabano” en la vilaĝeto Iizuka, kaj iris, serĉante, kie ĝi situas, kaj atingis la lokon, t. n. Maruyama. Ĝi estis la malnova kastelo de la guberniestro. Ĉe mi larmoj fluis, kiam oni montris ruinojn de ĉefa pordego k. a. En la apuda malnova templo [Iouzi] restas la ŝtona monumento de la familio. Antaŭ ĉio kortuŝis min la signo de du edzinoj. Miaj larmoj malsekigis manikon, ĉar, kvankam virinoj, iliaj nomoj fariĝis famaj tra la mondo, kiel laŭdindaj fidelulinoj. Ŝtona monumento, faliginta larmojn, troviĝas ne nur en fora Ĉinio, sed ankaŭ proksime. Enirinte la templon, mi petis teon, do montriĝas, ke ĉi tie estas konservitaj la glavo de Yositone kaj la dorsosako de Benkei, kiel trezoroj.

笈も太刀も五月にかされ昏幟

Kaj la dorsosakon, kaj la glavon

En majo montrigu pompe,

Ĉe la flagrubandoj.

[Oi mo tati mo satuki ni kazare kami nobori]

五月朔日の事にや

Tio okazis la unan de majo.

Rim.: Ĉiu ajn memoraĵo pri Yositone ĉiam larmigas Basyoo. Nuntempe jam ne troviĝas signo de du virinoj en la templo Iouzi, sed Yosa Buson pentris bildojn de du virinoj, vestitaj en kiraso kun armiloj. Buson vidis ĝin en la templo apud la loko Abumizuri [Letero de Buson al Kiyuu]. Buson ankaŭ, tre kortuŝite, ne povis ne pentri du virinojn. La hajko de Basyoo signifas, ke oni devas rememori estintajn bravulojn je la Festo de Knaboj, montrigante postlasitajn objektojn ĉe karpofiguraj flagrubandoj sub maja ĉielo.

Laŭ la taglibro de Sora ili vizitis la templon Iouzi en 2-a tago de kvina monato.

其夜飯塚にとまる 温泉あれは湯に入て宿をかるに土坐に筵を敷てあやしき貧家也 ともし火もなければろりの火かけに寐所をまうけてふす 夜に入て雷鳴雨しきりに降るてふせる上よりもり 蚤蚊にせゝられて眠らす 持病さへおこりて消入計になん 短夜の空もやうやう明れハ又旅立ぬ

Ĉi-nokte ni restis en la banloko Iizuka. Estas varma fonto, do ni baniĝis kaj tranoktis tie, kie estas stranga mizera domaĉo kun pajlomato, sternita rekte sur terplanko. Sen kia ajn lanterno ni kuŝis sur lito, kiun ni mem pretigis ĉe la kameno kun fajreto. Kiam noktiĝis, subite tondris kaj pluvegis senĉese, pluvoakvo likadis sur nin, kuŝantajn sur la lito, krome pikate de puloj kaj moskitoj, mi ne povis dormi. Reaperis eĉ mia kronika malsano, mi apenaŭ ne svenis. Fine lumiĝis ĉielo post la mallonga nokto kaj ni daŭre ekiris vojon.

Rim.: Lia kronika malsano estas galŝtono, koliko kaj hemoroida tubero.

猶よるの名残こころすゝます 馬かりて桑折の駅に出る はるかなる行末をかゝへてかゝる病覚束なしといへと 羈旅邊土の行脚捨身無常の觀念道路にしなん 是天の命也と気力とり直し道縦横に踏て伊達の大木戸をこす

Malvigla mi estas pro la lasta nokto. Pruntepreninte ĉevalojn, ni veturis al la poŝtostacio Koori. La vojo restas ankoraŭ tre longa, tia malsano preskaŭ senkuraĝigas min. Sed strebante pilgriman vojaĝon al malproksimaj landoj, penetrite de vanteco kaj preteco por forĵeti sin, liverante ĉion al la ĉiela ordono, ĉu mortos sur la vojo aŭ ne, do mi iomete revigliĝis kaj, piedbatante ĉiufanken, antaŭenpaŝis plu laŭ la vojo, kaj trairis la grandan fosajon, nomatan kiel la Granda palisaro de Date.

Rim.: La Granda palisaro de Date estas la loko, kie en 1189 la armeo de Huziwara Yasuhira estis venkita de Kamakura registaro. En unu aserto estas dirite, ke tiu Satou Motoharu mortis dum la tiama batalo.